



Decembro 1952

Januaro 1953. Nroj 4-5.

LA JUNEA VIVO

MONATA GAZETO DE

ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Giro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

REVIDO EN LA JARO 1952.

Jam rapide denove pasis jaro kaj estas nia kutimo fine de la jaro ĉirkaŭrigardi por konstati la progresojn aŭ malprogresojn, sukcesojn kaj malsukcesojn kaj helpe de tiuj faktoj fari novajn planojn.

Kaj ni vidis ĉirkaŭ, ni, triope: la prez., la helpsekr. kaj la kassisto kaj ni devis konstati, ke estas ankoraŭ multo, por kies efektivigo ni ĝis nun ne havis tempon, ke estas ankoraŭ multo, kio ankoraŭ ne estas efektivebla, sed ke aliaflanke estas aferoj, kiuj plifortigis la ekzistadon de nia organizo.

Ne estas superflue iom detale preparoli diversajn tiajn progresojn. „La Juna Vivo” pliboniĝis, tion ni povis konstati el la multaj leteroj, kiuj nin atingis post la kongreso en Ry. Tio ĝojigas nin, ĉar ni daŭre laboregas por fari nian organon kiel eble plej interesa. Ni mem konscias ke estas pluraj facetoj, kiuj ankoraŭ plibonigon bezonas, ke la enhavo ne

ĉiam estas same interesa, ke „La Burĝono” kelkfoje estas iom malfacila, mallonge L.J.V. ankoraŭ tute ne atingis la nivelon, al kiu ni intencas plialtigi ĝin. Tion ni mem ankoraŭ ne povas; por tio ni bezonas vian firman kunlaboron. De vi ni atendas de tempo al tempo artikoleton aŭ raporton, de

**La Estraro kaj Redakcio
deziras al vi feliĉan
novan jaron!**

vi ni atendas sugestojn, laŭdon aŭ mallaŭdon.

Alia paŝo antaŭen estas la pli bona taskodivido inter la estraranoj. La asesoroj nun prizorgas diversajn aferojn, kiuj antaŭe estis farataj de la prez. kaj sekr., kiuj nun do povas okupi sin pri aliaj gravaj aferoj, kiuj pli frue estis neglektataj aŭ ne sufiĉe atentataj pro tempomanko. Tiucele estiĝis la Informa Fako, la Dokumentado kaj Gazetarservo kaj la Vojaĝ- (daŭrigo sur la 2a kaj 3a paĝo)

PARENTEZE.

La unua kontakto.

Eksterordinare belega estis la vetero kaj la Esperantistoj el la eksterlando tre ĝuis — kun ravitaj vizaĝoj — la boatekskurson.

Troviĝis ankaŭ mi, studinta la internacian lingvon ankoraŭ nur kelkajn monatojn, kiel la plej juna estaĵo (escepte de la ŝiphundeto) sur tiu boato. Sentis mi la koron frapanta en mia gorĝo; ĉar ja venos la unua kontakto kun fremdlanda samideano!

Apud mi sidis blinda sinjoro kaj estis li kiu startis la konversacion.

„Bela vetero, ĉu ne?” estis la klasika demando lia.

„Jes, Sinjoro” venis la respondo mia, kaj mi forigis la ŝviton de mia frunto.

Kaj li daŭrigis, dum ke mi elpoŝigis mian vortareton maltrankvile (tamen li ja estis blinda ...): „Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis vian landon, tiam mi ankoraŭ havis la vidkapablon” (kun mallevitaj palpebroj mi enpoŝigis la vortareton, sentante min krimula) kaj mi mallaŭte parolis:

„Ĉu vere?”

Li kuraĝe persistis kaj diris: „Jes kaj via popolo estas treege afabla kaj gastama; via lando posedas ne-

priskrebeblajn naturbelajaĵojn, ho mi ŝatus loĝi en ĝi!”

Senvole mi pensis pri liaj okuloj kaj rediris:

„Ho vi troigas, Sinjoro.”

Kiam li estis scianta la nombron de miaj gefratoj, la lernejon en kiu mi studas kaj la muzikinstrumenton kiun mi ludas, ni ie alboridiĝis. Singarde mi gvidis la blindulon al la restoracio, kie li nepre volis regali min per glaciaĵo kun ĉokolado kaj por fini per limonado kun kantrunketo!

Dum la hejmenveturo la interparolado pli kaj pli vigliĝis kaj eĉ bedaŭris mi la aceton de mia vortareto. Ni parolis pri la progreso de nia idealo kaj poste eĉ pri politiko, rilate kion mi nur laŭbezone diris „jes” kaj „ne”.

Fine venis la adiaŭo dum kiu mi lin petis skribi sian nomon en la por tiu celo kunprenintan libreton. Venos la unua nomo nun!

Ah, tiam mi travivis la plejan seniluziigon en mia vivo: mi legis, ke li loĝas en tut-apuda vilaĝeto en mia lando!!

Mi ne sciigis al li nian reciprokan eraron kaj vespere mi ne ĉeestis la fest-vesperon



(daŭrigo de la 1a paĝo)

servo, pri kiuj ni baldaŭ esperas doni detalojn.

Denove ni havas kontakton kun niaj amikoj orient-eŭropaj, kiuj post iom da tempo regule esperas ricevi la legitajn LJV-ojn de niaj membroj. Nur malgranda nombro el niaj membroj kompre-

nas, kian servon ni tiamaniere faras al personoj, kiuj alie preskaŭ nenion ricevas el la eksterlando. Helpi ilin estas faro de vera esperantisteco.

Kompreneble ni faris pli, sed la spaco ne permesas trakti ankaŭ la subtilajn kaj malpli gra-

NOVAJ SERĈADOJ PRI LA PROBABLECO DE LA VIVO SUR MARSO.

La planedo Marso estas alproksimiĝanta al la Tero. Ĝiaj pozicioj je majo 1952, junio 1954 kaj septembro 1956 alproksimigos ĝin ĉiam pli al ni ĝis la minimuma distanco de 56 milionoj da kilometroj (septembro 1956). Oni pro tio rekomencas paroli, kun insistado, pri ĝiaj enigmoj, tio estas pri la probableco ke vivo ekzistas sur ĝia surfaco.

Kiam per la plej potencaj teleskopoj ni pririgardas tiun mondon pli malgrandan ol la Tero, ni ĉeestas superbela spektaklon. Ĝia lumeca globo el 6784 kilometra diametro, turniĝas sur sia klinata akso en 24 horoj kaj 37 minutoj, je la distanco de 228 milionoj da kilometroj de la Suno en la spaco de unu jaro, kiu sur Marso daŭras 687 tagojn.

Per la teleskopo oni observas ĝian larĝan polusan ĉapon kovritan de blindiganta neĝo, ĝiajn egajn kontinentojn, kiuj kovras la du trionojn de ĝia surfaco, ĝiajn malhelajn marojn kaj la misterajn kanalojn, tiom pridiskutitajn.

Sed tio kio pli impresas la astronomojn estas la ŝanĝiĝoj de la koloro en la malhelaj maroj, la apero, la duobliĝo kaj la malapero de la fenomeno konata sub la nomo de kanaloj, kiuj ripetigigas laŭ la sezonoj.

En printempo grizkolora zono malsupreniĝas de la polusoj al ekvatoro, kie ĝi alvenas post 130 tagoj per rapideco de 45 kilometroj en la 24 horoj. Poste la koloroj ŝanĝiĝas iĝante kaŝtankolora en somero. Aŭtune la koloro iĝas ruĝviola. Tamen apud la ekvatoro ekzistas zonoj, kiuj restas ĉiam verdkoloraj.

Oni pensis ekde la komenco ke tiuj kolorŝanĝiĝoj dependas, kiel sur la Tero, de la vegetacio. Sed tiu ĉi hipotezo levigis la plej vivajn kritikojn flanke de la astrofizikuloj. Ili pensas fakte ke la kolorvarioj, la apero kaj malapero de la tiel nomitaj kanaloj, k.t.p., povas esti geologiaj, fizikaj kaj hemiaj fenomenoj. En la libro: *Genèse et évolution de planètes* (1946), Dauvillier disvolvas tiun ĉi interpretadon.

Sed pli laste (1948), G. P. Guiper, en sia libro: *The atmospheres of Earth and Planets*, anoncis, ke li, per pli sentema spektroskopo, je ĉelo el plumbosulfuro, malkovris en la atmosfero de Marso, du striojn interruĝajn el la karbona acido kun intenseco respondanta je preskaŭ du fojojn al la 3/10.000, ekzistantaj en la tera atmosfero.

Tio pruvus do, ke la klorofila asimilo estus eble sur Marso. Kelkaj

vajn, almenaŭ por vi, aferojn.

Tamen, geamikoj, faru same kiel ni kaj ankaŭ rerigardu en la jaro 1952 por rekonsciiĝi, kion vi faris por T.E.J.O. Se vi povas konkludi, ke vi regule kaj aktive laboris, daŭrigu! Se vi faris malmulton aŭ nenion, ekaktiviĝu kaj

vi pli ĝuos vian membrecon en la ĝis nun malgranda armeo de konstantaj kunlaborantoj niaj. Nur tiam ni povas fidi en prospera nova jaro. En 1953 ni havu almenaŭ 1000 membrojn. Ĉu tio fariĝos realeco, dependas nur de vi!

T. K.

plantoj kun multpuŝita adaptpovo, tiuj, kiujn sur la Tero oni nomas anaerobioj kaj ankaŭ kelkaj algoj, ŝimoj, fungoj k.t.p. povus vivadi sur Marso kaj kolorigi egajn etendaĵojn de la planedo per iliaj pigmentoj.

Ĉi lastaj malkovroj faritaj per Guiper, konfirmas do ke vegetacio kaj malsupera faŭno efektive ekzistas sur la planedo Marso. Sed sub kia formo? Por nun ni ne havas la eblon koni ĝin. Kun multe da probableco, estas do tiu ĉi vegetacio, kiu kolorŝanĝiĝas dum la sezonoj kaj periode videbligas la famajn kanalojn kaj iliajn oazojn, kiel konfirmas ankaŭ la lastaj fotografajoj.

Sed rilate al la ekzistado sur Marso de pensanta kaj aganta homaro,

kiel tiu tera, eĉ per la plej potencaj teleskopoj ne estis eble certigi ĝis nun. Sur tiu planedo por nun oni povas individuigi nur punkton havanta almenaŭ dek kilometran diamentron. Ni devas pro tio atendi ke, je proksima morgaŭo, la astronautikuloj alvenintaj sur Marso'n, donu al ni raporton pri tio kion ili estos trovintaj sur tiu planedo, kiu tiom pasiĝas nin.

ETTORE DOMINICI

Fondinto kaj direktoro de la itala scienca revuo „La Scienza del Popolo” el Torino (Italia).

El la itala lingvo tradukis: Giacomo ROSE - Trieste.

SUB STELA FIRMAMENTO.

Kviete kaj silente jen kuŝas la malgrandaj domoj de la vilaĝeto, la kamparo ĉirkaŭe estas kovrita per blanka kovraĵo kaj la neĝkristaloj brilas en la lumo de la luno kvazaŭ etaj diamantoj. Malhele kaj mistere jen la piceoj de la arbaro silentas kaj la branĉoj kliniĝas sub la pezo de la blankaĵo. Ripozas la pejzaĝo en la rondo. Eĉ ne unu sono trapenetras la silenton de la vintra nokto.


Neatingeble altaj super ĉi tiu vintra mondo radias la steloj ĉe la malhela firmamento en mirinda beleco. Estis iam tempo, kiam la homoj ne ŝatis la oran briladon de tiuj diamantoj en la nokta ĉielo. Ni estis infanoj ankoraŭ, amiko. Ĉu vi rememoras la zumadon de la aviadiloj alte super ni? Aŭ ĉu vi jam forgesis tiujn noktojn, kiam la firmamento ĉe la horizonto kolorigis sangruĝa kaj la terura tondrado de la eksplodantaj bomboj rompis la noktan silentadon? Estis tiam nok-

toj, kiam ĉe la ĉielo pendis aliaj lumoj krom la steloj; ruĝaj kaj verdaj ili estis kaj inter ili kiel fulmoj flugis fajraj granatoj el la kantonuboj. Vi rememoras ankoraŭ. Pasis ja tiel longa tempo de tiam, ĉu? Tamen, estis nur kelkaj jaroj. Kaj ne forgesu tiun tempon, amiko. Neniam!

Rigardu, amiko, ni estas junaj ambaŭ kaj antaŭ ni kuŝas la tuta mondo. Ĝi ja estas tiel bela, mirinde bela! Ni povus esti feliĉaj kune, vi kaj mi kaj la aliaj homoj sur la tero. Donu al mi vian manon, amiko, kiu ajn vi estas kaj kie ajn estas via hejmo, ĉu en Anglio aŭ Germanio, Italio, Francio aŭ transmare. Kune ni paŝu antaŭen al feliĉa vivo!

..... kaj la steloj brilas super ni tra la eterneco. Iu saĝa homo iam diris, ke ili similas idealojn. Ni neniam atingos ilin, sed kiel la maristoj ni direktas nian kurson laŭ ili.

Reneo Mariano.



9^a kongreso en Wörgl

WÖRGL/AŬSTRIO — KONGRESLOKO.

3—10 Aŭg. 1953a.

La nomo de tiu ĉi plej juna urbo aŭstria estas jam sufiĉe konata inter la tutmonda Esperantistaro pro la unika okazaĵo pasintsomera, la starigo kaj plej solena inaŭguro de l'unua monumento en Aŭstrio honore al la granda pacapostolo kaj bonfarinto de l'homaro, nia kara majstro Zamenhof. Tiu ĉi okazaĵo faras la junan urbon inda, esti la venontjara T.E.J.O.-renkontejo, per kio ĉiu partoprenonto plenumos sian dankŝuldon al Wörgl, kiu tiom faris por Esperanto, por ties kreinto kaj por la mondpacca ideo.

Wörgl kun siaj 6000 enloĝantoj situas enmeze de tirolaj montoj ĉe rivero Inn, estas grava krucpunkto de fervojaj linioj Wien-Paris, Berlin-Rom (do Oriento-Okcidento, Nordo-Sudo) kaj donas plej bonajn eblecojn por belegaj ekskursoj al proksimaj lagoj kaj montegoj. La

tirola ĉefurbo Innsbruck estas trajne atingebla post 55-minuta veturado, la pitoreska urbo Kufstein (ĉe landlimo aŭstria-germana) eĉ jam post 20 minutoj.

Kronikisto el Wörgl, s-ro Georg Opperer, aŭstria, transprenis la taskon skribi por la organo L.J.V. sinsekve mallongajn artikolojn klarigajn pri Wörgl kaj ties ĉirkaŭaĵo kaj komencis per historia evoluigo de la urbo.

Wörgl kun sia tre progresema, ĵus sian 70-an naskiĝtagon festinta urbestro kaj la jam fondita L.O.K. *invitas tre kore vin ĉiujn kaj alvokas al vi, kie ajn en la mondo vi estas: Koran Bonvenon!*

(Adreso: T.E.J.O.-Kongreso 1953, Wörgl, Aŭstrio. — Petante iun ajn informon nepre aldonu ĝuste stampitan respondkuponon!).

Por L.O.K.: Hans Steiner.

HISTORIA EVOLUIĜO DE WÖRGL.

Rigardo en la historion de Wörgl konvinkas, ke ties enloĝantoj jam ĉiam defendis certan sendependecon. Nek la Iliroj, kiuj en la 6-a aŭ 7-a jarcento antaŭ Kristo ĉi tie restadis, nek la Romanoj, kies ĉeesto en la unua jarcento post Kristo povas esti

konstatata, postlasis ĉi tie signon de sia kulturigo. Eĉ neniu grafo aŭ monahejo favoris la lokon.

Jen formiĝis pro la trafiko sur la landstrato, pro la vojetoj el la ĉirkaŭe situantaj vilaĝoj kaj speciale pro la tiama ŝipveturado sur la ri-

vero Inn jam meze de la unua jar-milo p. Kr. laŭnatura renkontiĝa punkto por vojaĝantoj. Ekestis gastejoj, provizejoj por kolektado de komercaĵoj, staloj kaj remizoj por ĉevaloj kaj veturiloj de veturigistoj — kaj metiistoj kaj komercistoj tie ĉi ekloĝis.

Politike kaj eklezie Wörgl estis frakcio de la najbara komunumo Kirchbichl ĝis la 15-a jarcento. Ekde tiu tempo la loko estas memstara vilaĝ- kaj paroĥa komunumo. Laboremema, progresema, akcelata per la konstruado de fervojoj (1859 resp. 1873/75) el la vilaĝo en 1911 fariĝis vilaĝego. Jen do la evoluigo ekde la jaro 790, kiam Wörgl ankoraŭ estis parto de la komunumo Kirchbichl, ekde 1440 memstara vilaĝo kun propra komunumestro kaj ekde 1911 vilaĝego.

Kulture, ekonomie kaj asocie je atentinda alteco, ekipita per la necesaj instalaĵoj, kondukis la diligento kaj progresema evoluigo de la

metiistoj, la alĉutimiĝo de la komercistoj al la estantaj cirkonstancoj kaj la evoluigo de la socia vivo al meritita rekompenco, kio okazis en 1951 per la urbeknomigo.

Du faktoj faris la vilaĝegon resp. la urbon Wörgl mondkonata:

En 1932a la tiama urbestro Michael Unterguggenberger enkondukis specialan lokan monon, nomata „Freigeld” (libermono), kiu entreprenado trovis ĝeneralan atenton. Multaj privataj kaj ŝtataj financafakuloj venis al Wörgl, por rigardi la taŭgecon de tiu mono kaj ĝian praktikan uzadon.

En 1952a estis starigata ĉi tie bela monumento por la patro de la Esperantismo, en kies solenaĵo la urba komunumo aktive kaj kun granda intereso partoprenis.

Ĉi ĉiuj okazaĵoj kaj akiraĵoj kaj la nuntempa agado de la urba konsidantaro pruvas, ke la komunumo nenion perdis de sia dekomenca sendependeco aŭ memstareco.

Gg. Opperer.

AMSTERDAMO, tiu granda urbo, estas konstruita sur fostoj. Se iam tia urbo disfalus, de kiu estos pagataj la damaĝoj.

Karaj amikoj, jen malnova rime-to. Eble vi estis iam en Amsterdamo kaj ĝuis plene la belegajn konstruaĵojn, stratetojn kaj kanalojn. Estas kompreneble, ke ni, nederlandanoj fieras pri nia ĉefurbo kaj prave oni parolas en nia malgranda lando pri tiom granda urbo. Al vi mi povas multe rakonti pri Amsterdamo kaj ĝia historio sed ĉifoje mi preferas diri ion pri serioza temo pri Amsterdamo en la nuna tempo. Ĉu ni venas al Londono, ĉu al Parizo aŭ Novjorko, ĉie regas la krimo en ia ajn formo. Ĉie oni trovas tiujn kvartalojn, kie la prostituado estas terura. En tiuj kvartaloj ankaŭ vivas infanoj kaj junuloj. Ili vivadas en tiu malklara sfero de malĉasteco kaj kreskas al plenkreskuloj en tiu

abomena medio. Ili ne konas la agrablan hejman vivon kaj intima komuna vespermanĝado estas al ili fremda.

Dum sia junaĝo ili interkonatiĝis kun la senkompata vivo. Ili vidas kiel policistoj arestas siajn patrojn aŭ patrinetojn. Ili estas la ĉestantoj de akraj disputoj inter siaj gepatroj kaj de la vizitoj ĉe la patrinetoj. Antaŭe ili ludis sur la stratoj kaj lernis kiel eble plej oportune ŝteli ion kaj ankoraŭ pli frue ho karaj geamikoj mi ĉesigu la skribadon pri tiom da misero. Eble vi jam konas tian situacion kaj povas sekvi miajn pensojn.

Feliĉe estas homoj, kiuj komprenas, ke la vivo por tiuj gejunuloj povas esti tute alia, montrante tion

per la prezentado de la bela flanko de la vivo. Tiuj gejunuloj povas lerni profesion kaj do povas iri alian vojon dum la vivo. Estas rimarkinde, ke multaj el ili havas bonan intelekton kaj ofte ricevas bonajn oficojn en la socio.

Ekzistas asocio, kiu protektas tiujn gejunulojn kontraŭ la enabismigo de honto kaj mizero. Nuntempe estas eĉ multaj tiaj asocioj, kiuj laboras en diversaj kvartaloj de la urbo sed por unu el ili mi volas peti vian atenton, nome, La asocio „Pro Juventute”, unu el la plej malnovaj. Dum kelka tempo mi estis gvidanto de tiu ĉi grupo kaj speciale de grupo da knaboj, kiuj admiris la tropikajn akvariojn. Mi migris kun ili tra la naturo. Ho, se vi nur povus konstati kiom tiuj dezertaj knaboj moliĝis dum la naskiĝo de birdidoj kaj fiŝidoj ktp.

Ili vidas la alian flankon de la vivo kaj forgesas la momenton, en

kiu ili sentas la impulson forpreni ion, kio ne apartenis al ili.

Nun tiuj knaboj ankaŭ deziras kolektadi poŝtmarkojn kaj volonte el la tuta mondo. Kion mi povas fari pli efike ol demandi al miaj tutmondaj esperantistaj geamikoj? Sendu multnombre bildkartojn al tiuj ĉi knaboj! Tiam ili ricevos la deziratajn poŝtmarkojn, krome bildojn el la tuta mondo kaj se vi skribos kelkajn esperantlingvajn vortojn sur la karto, ili ankaŭ eksciios pri nia mondlingvo.

Ne hezitu, multaj knabokuloj rigardas al via agado. Jen estas la adreso:

Junulara Laborejo „Pro Juventute”, Galerij 6-7, Amsterdamo, Nederlando.

Anticipe dankas vin pro via kunlaboro via: A. Blickman, Schouwstraat 16, Nieuwendam-Amsterdam (N.), Nederlando.

DOKUMENTADO KAJ GAZETARSERVO (D.G.) DE T.E.J.O.

Zorganto: M. Duc Goninaz, 12 Place de la République, Paris 10, Francio.

La ĉefaj taskoj de la D.G. estas jenaj:

1. Kolektado de ĉiaj artikoloj, kiuj koncernas T.E.J.O.-n.
2. Kompilado de ĉiuj gravaj okazaĵoj en la organizaĵo.
3. Sendo al la perantoj de freŝdataj informoj.
4. Prizorgo de la raportoj pri la kongresoj de T.E.J.O. en la esperanta gazetaro.

Tiuj taskoj estas utilaj kaj efektivegeblaj nur se ni havas la plenan kunlaboron de la naciaj kaj lokaj perantoj de T.E.J.O. Pri la malforteco de nia organizo respondecas plej ofte la malaktiveco kaj maldiligenteco de la perantoj. En la kadro de la D.G. ni petas de ili la jenon:

- ili sendu al D.G. ĉiujn artikolojn esperantlingvajn aŭ nacilingvajn, ĉerpitajn el gazetoj, pri T.E.J.O.
- ili informu D.G. on pri landaj aŭ lokaj kunvenoj de T.E.J.O.-anoj, gravaj decidoj aŭ sukcesoj sur la nacia tereno.
- ili zorgu pri aperigo en la esperantlingvaj aŭ nacilingvaj gazetoj kaj bultenoj en siaj landoj de la informoj, kiujn ili ricevos de la D.G. pere de „Gazetara Bulteno”, aperonta ĉiutrimonate.

Ni konsideras ĉiujn perantojn kiel kunlaborantojn. Ni ankaŭ esperas je la kunlaboro de ĉiuj bonvolaj membroj. Nur tiukondiĉe la D.G. plenumos efike sian rolon. Antaŭdankon al ĉiuj.

D. G.-Servo.

Zorgu, ke antaŭ la 1a de septembro '53a ni havu almenaŭ mil abonantojn. Kiu donos bonan ekzemplon?

ĜOJIGA SCIIGO EL NANCY.

Gesperantistoj ĉiuĝaj, kiuj deziras viziti nian urbon aŭ vojaĝi en nia regiono, povas tranokti en Nancy en la Junular-domo.

La prezo de lito kun kovriloj estas 70 fr.fr. ponokte. Vi ne ricevos lit-tukojn. Estas apartaj dormejoj por viroj kaj virinoj. Vi povas ankaŭ manĝi en la restoracio po malalta prezo: 170 fr.fr. por izoluloj, aŭ 130 fr.fr. per biletaro. (Vi kontaktu esperantistojn por akiri biletarojn).

Prefere vi anoncu vin sufiĉe frue.

Skribu al JUNUL-RONDO, 36. Cours Leopold, NANCY, Francio.

LA JUNULAR-PAGO DE FRANCA ĴURNALO ENHAVAS REGULE ARTIKOLOJN PRI ESPERANTO.

La Nordfranca Ĵurnalo „NORD ECLAIR” publikigas ĉiudimanĉe informojn pri Esperanto, en la kadro de sia junular-paĝo.

Jam aperis ilustritaj artikoloj pri nia TEJO' renkonto en RY, la Franca Esperanto-Kastelo en BAUGE, la Universala Kongreso en OSLO, ktp.

Krome, mallongaj informoj regule sciigas al la legantaro la lastajn novaĵojn pri la internacia Esperanto-movado. 15-leciona kurso aperos ekde Januaro 1953.

Okupigas pri tiu Esperanta kroniko ĉe „NORD ECLAIR”, nia amiko Lucien GILOTEAUX, TEJO' ano, 28 Rue des Jardins, CROIX (Nord) FRANC-UJO.

Respondo al la artikolo aperinta en L.J.V. novembra nro, paĝo 28.

Propagandi la internacian lingvon en la rondoj de la Junulara-Ruĝa-Kruco, kiel sugestas la aŭstriaĵ samideanoj en la novembra nro de L.J.V. certe estas stimulinde afero.

Eble interesas vin scii, ke en Belgio oni jam estas sur la bona vojo: en aŭgusto 1951a, tuj post la haarlema I.J.K. okazis en la valona vilaĝeto Villers la Ville granda nacia tendaro de junaj Ruĝa-Krucanoj, en kiu funkciis speciala Esperanto-sek-

cio. Kiel eksterlanda partoprenanto la subskribinto ĉeestis. Dum unu semajno la belga, Ruĝa-Kruca kaj Esperanta flagoj flirtis samideane super nia kampo. Ĝin gvidis sro M. Jaumotte, nacia komisaro de la belga Ruĝa Kruco kaj ĉefestrarano de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

La belgaj Ruĝ-Krucanoj povas akiri specialan insignon, kiu atestas, ke ili scipovas Esperanton.

Helmi Veldhuyzen.

Lingvon oni ne nur buŝe ekzercas, sed ankaŭ skribe. Korespondu kun via ĝeamikoj en la tuta mondo!

ORGANIZAJ INFORMOJ.

Sekre-ejo Lombokstr. 2, Leeuwarden (Ned.).

La Juna Vivo: Ĝis nun ĉiam kuniĝis la marta-aprila kaj julia-aŭg. numeroj. Pro la fakto, ke la tempospaco inter tiuj aperoj estas tiom mallonga, ni decidis kuniĝi la dec.-jan. nrojn kaj aparte aperigi la martan kaj aprilan nrojn. La arango de la julio-aŭg. nroj restas la sama.

Korekto: Rilate al la Organizaj Informoj en la nov. nro: **akre** politik-tendencaj artikoloj ankaŭ ne estas akceptataj por la rubriko „Ĉu ne”.

Perantoj: „La Peranto inter la Perantoj” je nia bedaŭro ne povis esti preta en Nov. Ĝi aperis en Dec.

Bonvolu aldoni al la adreso de nia itala peranto Prof. Camuffo Armando: PĈK. II-5277, Tel. 42-I-48.

Ankaŭ en Kanado ni nun havas peranton! La el Hamburgo elmigrinta Max. Frense jam aktive laboras en sia nova patrio kaj kun fervoro akceptis tiun taskon. Lia adreso estas: III Mac Donald Ave, Sault Ste. Marie, Ont., Kanado. Ni deziras al li multan sukceson!

Membreco: Via membreco de T.E.J.O. (do ankaŭ via abono je LJV) ĉiujare aŭtomate estas daŭrigata, se vi ne sciigis al la administracio, ke vi volas ekŝigi.

Verkajo- kaj Fotokonkurso: Pro la iom neregula apero de la lastaj nroj de nia organo, ni decidis, ke oni povas enŝandi verkaĵojn kaj fotojn ĝis la 15a de Febr. La nomoj de la gajnintoj aperos en la marta nro. Ni atentigas vin je tio, ke la fotoj ricevataj estas konsiderataj propraĵo de T.E.J.O. Ili estos konservataj en albumo kaj eble en la venonta kongreso estos montrataj per lumbildaparato.

Estraro: Lastmomente atingis nin la malagrabra sciigo, ke Helmi Veldhuyzen, kiu dum kelkaj jaroj aktive laboris por nia organizo, pro tempo-manko kaj izoliteco ekŝigis el la estraro. Pro la multege da laboro, kiun ŝi faris, ni elkore dankas ŝin.

Taga estraro:

Prezidanto kaj sekretario:

Tammo Kanter, Lombokstr. 2. Leeuwarden, Nederlando.

Helpsekretario:

Felix H. Kat, sama adreso.

Kasisto kaj administranto:

Geert de Vries, AB, Bosdijk 771. Eindhoven, Nederlando.

Geasesoroj:

Informa Fako vakas:

Dokumentado kaj gazetarservo:

Mich. Duc Goninaz, 12 Place de la République, Paris X.
Francio.

Vojaĝservo:

Kurt Meyer, Parkstr. 99. Bremen, Germanio.

Ĉu vi estas malkontenta? Diru ĝin al ni!



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Finnlando: Komencanto! Sendu 50 poŝtmarkojn al Sro J. Sive, SARA.


Francio: Junul-Rondo, 36 Cours Leopold, Nancy, serĉas gekoresp. en la tuta mondo por gekom. Letervesp. estos org. la 10an de marto 1952. Skribu grandnombre.

Germanio (DDR): 22 gejunuloj inter 13 kaj 17 jaroj dez. kor. k. ĉiuj landoj. Skribu multnombre al Paul Glöckner, 10 Pirna-Copitz, Damaschkestr. 24, Sachsen.

KRUCVORT-ENIGMO.

Ĝis la 25a de Februaro 1953 la Redakcio povas akcepti la solvojn. (adr. Red. L.J.V.: Markt 64, Geleen, Ned.).

Inter la solvintoj ni dislotos TRI premiojn.



N.B. (r.) signifas: radikoj.

Horizontale:

1. Aro de entute sep; per pinta objekto dolorigi iun.

2. Bonstatan.
3. Tre alta grado (r.); konstruaĵo (r.); du samaj konsonantoj.
4. Interpunkcia signo (r.); konsonanto; adverbo korelativa.
5. La malo de senvalora (r.); ĉirkaŭas la pentraĵon (r.).
6. Konsonanto; neuzita plus la 15a konsonanto de la alfabeto; peranto (mallongigo).
7. Krokodilo.
8. Konsonanto; 365 tagoj plus la 18a letero de la alfabeto; konsonanto.
9. Helplingvo; konsonanto; persona pronomo.

Vertikale:

1. Komerco kun granda risko (r.).
2. Korna elkreskaĵo al la kruroj de virkoko (r.); konsonanto; konsonanto.
3. Prepozicio; ruĝa farbo.
4. Ero de la skeleto (r.); altira pro ia interesaĵo.
5. Sangosuĉanta insekto (r.); membrigi (r.).
6. Prepozicio; dombesto.
7. Antaŭenmovi (r.); pafilego.
8. Infaneto de dombesto (r.); konsonanto; notu (mallongigo).
9. Intermeti, enŝovi (aritmetiko), (r.).

Ĉu vi estas kontenta kun nia organizo? Diru ĝin al aliaj!

MONATA OR INO
POR LA ASE AN 1 ANOJ

KELKAJ AŬSTRALIAJ FABELOJ.

Multaj homoj opinias, ke la aŭstraliaj indiĝenoj estas simpla kaj infaneca popolo. Tamen, iliaj fabeloj posedas akran sprit-senton.

Aŭdu jen la fabelon pri

Din-e-wan.

Din-e-wan estis mallaborema, maljuna, granda birdo. Iun pluvan tagon li ripozis en sia barako apud la fajro. Liaj du edzinoj servis al li. De tempo al tempo li sendis ilin eksteren en la pluvon; denove kaj denove ili devis alporti lignon por la fajro.

Al la edzinoj tre malplaĉis tio. Ili planis venĝon kontraŭ la senkompata edzo.

Ekstere ili kolektis pecojn da arboŝeloj kaj eniris la barakon tute malsekaj. Per la arboŝeloj ili jetis multe da ruĝvarmegaj cindroj sur la edzon.

La flugiloj de Din-e-wan ekbrulis kaj li kuregis en la pluvon. La pluvo estingis la fajron, sed la flugiloj de Din-e-wan mallongiĝis.

Tial ĝi povas nur kuri, sed ne flugi.

Fabelo pri la

„KUKABARA”.

La unua „kukabara” (speco de fiŝmanĝanta marbirdo, kiu eligas homsimilan ridon) estis tre serioza birdo. Iun tagon ĝi sidis sur branĉo de eŭkalipta arbo. Sube, sur rokego kuŝis serpento. Apud la rokego saltetadis malgranda Jirri-jirri (motacilo).

La kukabara rigardis malsupren. Kion ĝi vidis? Ĝi vidis, ke la serpento invitas la Jirri-jirrion enrigardi ĝian buŝon. Tion faris la helpema birdeto. La serpento subite klakfermis la makzelojn kaj englutis la motacilon.

Sed la tago varmiĝis ekdormis la serpento kaj malfermis la makzelojn je granda oscedo. Bip!! Tuj elsaltis la birdeto el ĝia buŝo. La surpriza mieno de la serpento tre amuzis la kukabaraon kaj ĝi ekridegis. De post tiam ĝi ne plu estas serioza, sed gaja birdo.

LA STELOJ

diras iuj triboj, estas pecoj el la luno.

Tutaj familioj de lunoj loĝis en lando apud granda giganto. Li atakis ilin dum ke ili vagis tra la ĉielo kaj dispecigis ilin en milojn da steloj.

Tiujn ĉi mitojn oni rakontas ne nur buŝe, do ne nur parole kaj kante, sed ankaŭ per pentraĵoj sur rokmuroj, arboŝeloj, ligno- kaj kavernaj muroj. Ili estas parto de la religio, kio ligas la primitivan homon al sia loĝloko.

Ĉu vi scias,

kial la kanguruo saltadas?

Ne? Aŭskultu bone, kion la indiĝenoj en la okcidenta parto de la ŝtato Nov-Sud-Kimrujo pri tio rakontas:

Borah, la kanguruo, originale estis kvarpedulo, kiel ĉiuj aliaj bestoj.

Iun nokton ĝi manĝis sur la ebenaĵo. Ĝi ekvidis fajron kaj aŭdis strangajn bruojn. Li esploris la aferon. Li aŭdis brunulojn kriegi. Ili saltis je „corroboree”. Tio estas ceremonio, en kio la indiĝenoj prezentas la mitojn. La kanguruo iris al la homrondo kaj kundancis. Kompreneble nur sur du kruroj, kiel la viroj.

Kiam la indiĝenoj rimarkis, ke kanguruo kundancas, ili ektimis, ke ĝi perfidos la triban sekreton. Tial ili forfrapis la du „hundo-dentojn” de la kanguruo. Tion oni faras dum la viriĝa ceremonio ĉe la knaboj. Tial mankas al la kanguruo la du hundo-dentoj kaj ĝi saltadas sur du kruroj.

Preskaŭ ĉiuj triboj timas pri krokodiloj, sed la indiĝenoj, kiuj loĝas apud la rivero Kendall (ĝi fluas en la Golfon de Capentaria) kredas, ke ili estas sangfratoj de la krokodiloj. Kiam knabo partoprenas la viriĝan ceremonion, la plej maljuna ano de la tribo prenas junan la-certon. Li trempas ĝin en la sangon de la knabo. Poste li ĵetas ĝin en la riveron. Ili kredas, ke ĝi tie ŝanĝiĝas je krokodilo. Estas strange, sed la anoj de la Kendall-tribo povas libere naĝi en la rivero. La krokodiloj ne atakas ilin.

KARAJ INFANOJ,

vi certe scias, ke La Burĝono estas **via propra revueto**. Ĉu vi estas kontentaj? Ĉu ni uzas malfacilajn vortojn? Ĉu vi volas, ke ni klarigu ilin? Skribu vian opinion al ni, ni ĝojos pri tio. Helpu plibeligi La Burĝono-n. Dankon!